



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Abonu kaj
legu
Pilo-Press

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 6/78 - 8 febr 1978
Aperas ĉiusemajne

Grava evento - Radio Moskvo sendis en Esperanto

Nürnberg (pp) - La anoncita Esperanto-elsendo de Radio Moskvo okazis laŭprograme sabate, la 4-an de februaro kun ripetoj samtage kaj dimanĉe.

Oni povis aŭdi la rememorojn de s-ro Podkaminer pri sia esperantistiĝo kiel ruĝgvardiano post la unua mondmilito, pri la SAT-kongreso en 1926 kaj la vortoj de Lunacarski, la honorprotektanto de la SAT-kongreso. Plue oni povis aŭdi ion pri la evoluo de la Esperanto-movado en Sovetunio, kies kulmino estis en la dudekaj jaroj. Dum la milito kaj malvarmilita tempo Esperanto silentis en Sovetunio; nur en la kvindekaj jaroj Esperanto denove reviviĝis.

Sekvis kelkaj aktualaj informoj pri Esperanto en tiu granda lando, i.a. la informo, ke la nova konstitucio de Sovetunio pasintjara vaste estis diskutita en la tiea Esperanto-grupoj kaj jam tradukita en Esperanto.

Oni ne forgesis la Olimpiajn ludojn en la jaro 1980 kaj la koncernajn laborojn de la Esperantomovado tiucele. Laŭ la spertoj de la ludoj en Munkeno kaj Montrealo la rusaj esperantistoj preparos frazarlibreton en Esperanto kaj aliaj lingvoj surbaze de la Kanada broŝuro el la jaro 1976 konsiderante la sovetuniajn cirkonstancojn. Ĝustatempe oni sendos la broŝuron al la landaj asocioj por tradukoj en la koncernajn lingvojn. La sovetuniaj esperantistoj, laŭ la elsendo, estas pretaj akcepti la tutmondajn esperantistojn en la jaro 1980 kaj gvidi ilin al la konkursoj kaj la urboj.

Fine, oni ne forgesis kanton en Esperanto. Oni ludis kanton, cetere tre bone kompreneblan, el litovia disko.

La tuta elsendo daŭris ĉ. kvarona horo fine de la itallingva elsendo.

Nia komentario

Komence ni konstatu, ke la unua Esperanto-elsendo el Moskvo plene sukcesis. Fakte ĝi estis informa elsendo pri la stato de Esperanto en Sovetunio. Kaj la rememoraĵoj vortoj de s-ro Podkaminer el Leningrado kaj la voĉoj de la geparolitoj estis tre bone aŭskulteblaj kaj kompreneblaj. Speciale nin surprizis la bonega prononcado de Esperanto fare de la geparolitoj. Cetere, Podkaminer estis unu el la sekretarioj de la Leningrada kongreso en la jaro 1926.

Kio koncernas la aŭdeblecon, verŝajne la aŭskultantoj en diversaj landoj kolektis diversajn spertojn. Sed sperta esperantisto tamen sufiĉe bone komprenis. Ni ne forgesu, ke la elsendo unuvice estis direktita al Italujo kaj italaj aŭskultantoj. Mirigis nin ja lafakto, ke ĝuste al italoj sin turnas la Esperanto-elsendo. Nu, la enigmo sin malkaŝis al mi dum la elsendo mem: estis ĉefe la italo d-ro Renato Corsetti kaj esperantisto el Milano, kiu instigis la elsendon - se mi bone komprenis la itallingvaj klarigojn pri la elsendo en Esperanto. Estis certe bonege - ankaŭ el propagandaj vidpunktoj - ke oni itallingve kelkfoje klarigis itallingve, ke temas pri Esperanto en Sovetunio.

Je la sama tempo kaj en la sama bendo Moskvo ja elsendas en diversaj lingvoj. Estis do avantaĝo, se esperantisto, kiu serĉis la elsendon, iomete komprenis la italan, ĉar la aŭskultebleco - speciale sur mallong-

Pri Moskvo (daŭrigo)

estis
mallongondo - tre malfacila. Sed tamen, trovinte la ĝustan lokon sur la skalo, la elsendo estis ĉi tie en Nürnberg sufiĉe bone aŭdebla, speciale dum la ripetoj sur la meza ondo 194 m. Sed tamen certa lerteco en la aŭskultado de radio multe helpis!

Esperable multe da esperantistoj provis kaj sukcesis aŭskulti la bonan elsendon el Moskvo. La elsendo estis bona komenco. Ĉu Moskvo daŭrigos la Esperanto-elsendon, ne nur kadre de unu lingvo, sed direktita al ĉiuj esperantistoj, ni diru, en Eŭropo, tio sendube dependos de la reeĥo de la esperantistoj. Nur tujaj korespondaĵoj pri la ĵusa elsendo povos tion influi. Oni skribu do al

Radio Moskvo, itala fako, s-ro V.K. Švecov, Pjytnickaja 25
SU-113 035 Moskvo, USSR.

Parlamentara Grupo por Esperanto en Italujo

Romo (pp) - La prezidanto de la Organiza Komitato de la 30-a Internacia Kongreso de la Fervojistoj-Esperantistoj per letero de la 78-01-19 informas:

Kun granda plezuro mi informas, ke hieraŭ, la 18-1-1978, naskiĝis en Italio la parlamentara grupo de la "Amikoj de Esperanto".

La registara krizo, okazinta du tagojn antaŭe, certe ne favoris ĉi tiun naskiĝon, ĉar la parlamento estis fermita kaj la plej parto de la parlamentanoj reiris hejmen. Krome okazis samtempe kunsido de la eŭropa parlamento kaj la koncernaj italaj parlamentanoj estis eksterlande.

Tamen, ĉar la kunvokinto, senatano Alberto Del Nero (kristandemokrata), ricevis 30 leterojn de aliĝintoj, la ĉeestantoj decidis starigi tuj la diritan parlamentan grupon donante al la sama senatano Del Nero kaj al la aliaj ses proponintoj la taskon direkti provizore la grupon mem, ĝis la nova kunveno, dum kiu oni aprobas la statuton kaj oni elektos, laŭ ĝi, la estraron.

La provizora estraro konsistas el kvar senatanoj (Del Nero, Foschi, Maravalle, Veronesi) kaj tri deputitoj (Bandiera, Nicolazzi, Sanese). Ili estas membroj de kvin diversaj partioj.

Senatano Del Nero intencas kunvoki la duan asembleon de la "Amikoj de Esperanto" tuj post la solvo de la registara krizo: ĉar, bedaŭrinde, ĉi tiu estas malfacile solvebla, ekzistas la timinda ebleco de antaŭcipitaj balotoj, kiuj povus fiaskigi la atingitajn rezultojn.

Alie ni rajtas diri, de Esperanto faris grandan paŝon sur la vojo de la venko en Italio.

Nun la sekvanta paŝo estas krei eksterlande similajn parlamentajn grupojn (laŭ la ekzemplo donita en Italio fare de la LKK de la 30-a internacia fervojista kongreso de IFEF - kunlabore kun ĉiuj lokaj grupoj de la Itala Esperanto-Federacio) kaj starigi tuj poste la internacian parlamentan grupon.

El tiu rezulto sekvas la venko de Esperanto mondscale.

La prezidanto Alberto Menabene

Olimpikaj Ludoj tajpos itale

Romo (pp) - Laŭ informo de la Esperanto-Redakcio de Radio Romo, la itala entrepreno "Olivetti" liveros pli ol 3 000 skribmaŝinojn kaj ĉiujn bezonatajn instalaĵojn por funkciigi la gazetarajn servojn, okaze de la Olimpikaj Ludoj de 1980, kiuj havos lokon en Moskvo (Sovetunio).

Letero de leganto

En Pilo-Press 4/78 mi legis la komenton de d-ro Macher.

Komence mi deziras esprimi mian kontentecon, ke d-ro Macher kelkfoje jam tuŝis problemojn, kiuj inter esperantistoj ofte estas evitataj. Ankaŭ "Atomenergio" estas temo, kiun oni nepre diskutu kaj ĝi eĉ neniel kontraŭas ian neŭtralecon, ĉar ĝi koncernas la homan vivon ĝenerale.

Tamen ŝajnas al mi, ke d-ro Macher iom tro supraĵe traktas la temon. Unua eraro: La protestoj kontraŭ la atomreaktoroj ne komenciĝis nur antaŭ du jaroj, sed multe pli frue.

Dua eraro: La ĝis nun laborantaj reaktoroj en la tuta mondo ja parte funkcias, sed ili ankaŭ ofte ne funkcias pro perturboj, intersanĝo de brulpiloj, riparoj, normala "flegado" ktp. Ĉiu "ripoztago" ekz. en Würzgassen (Germanio) kostas 300 000 GM.

Tria eraro: Ne pasos jaroj, ĝis kiam necesos forigi la unuajn eluzitajn brulpilojn, sed ekz. la reaktoro Würzgassen ĉiujare dum 2 monatoj estas prenata el la funkcio, por ŝanĝi la pilojn.

Kvara eraro (kaj plej grava): En neniu alia lando oni ĝis nun trovis taŭgajn forĵetejojn por la atom-rubaĵo! Nur en Francio ekzistas ejo en La Hague (duoninsulo Cotentin), kien momente ankoraŭ kelkaj eŭropaj landoj rajtas sendi sian atomrubaĵon kaj kie jam okazis strikoj kaj grandaj skandaloj. En Germanio (BRD) oni akre disputas pro la planita entingo de tiaj radioaktivaĵoj ĉe Gorleben en kelkcentmetra profundeco. Tutklare oni povas konstati, ke la ordinara popolo, kiu de la politikistoj de ĉiuj partioj ne estas demandita, grandparte kontraŭas la riskon de tia energiformo, precipe tiuj homoj, kiuj loĝas proksime al tiaj reaktoroj aŭ planataj "senzorgejoj". Neniu ĝis nun scias, kiel garantiĝi dum la venontaj mil aŭ dekmil jaroj, ke la rubaĵo, sed ankaŭ la post 25 jaroj ne plu funkciantaj reaktoroj, neniam radios, ĉu pro geologiaj kaŭzoj (ekz. tertremo), pro inundo, pro milito, pro terorismo aŭ simple pro nesingardo flanke de homoj.

Kvina eraro: Tutcerte la ekonomio funkcios ankaŭ sen atomenergio. Sed la registaroj devus instali la miliardojn, kiujn ili de jaroj elspezas por la atomreaktoroj, en la esploron de aliaj energiformoj multpromesaj, ekz. suno, vento, glaciejoj, termoenergio, oceanoj. Kaj la homoj devus lerni ŝpari energion, limigi sin je la necesaj artikloj, nutraĵoj, bezonaĵoj kaj ĉesi la teruran kutimon forĵeti ĉion kaj ĉion ne plu uzatan. Nia tero baldaŭ estos je la fino de siaj provizoj. Ni komprenu finfine, ke la senlima kreskado de la ekonomia produktado ne nur atingis sian finon kaj kulminon, sed inversos sian direkton. Tio negative influos ankaŭ la foruzadon de energio, kiel oni jam povas observi.

Neniu tekniko estas perfekta, ĉar nenio homa estas perfekta. La danĝeroj kaj riskoj estas teruraj. Ĉu iu kapablas imagi la konsekvencojn, se la soveta satelito fine de januaro estus falinta en grandan urbon? Kiom da mortigitoj kaj dumvive venenigitoj? Ĉiuj germanlingvanoj legu la skuan libron "Der Atomstaat" de Robert Jungk, Kindler-Eldonejo. Ĝi malfermos ĉies okulojn. Ni lernu nian lecionon, ju pli frue, des pli bone. Alie venos la tago, kiam estos tro malfrue.

Joachim Giessner, Herzberg (Harz)

Mortis S-ino Haudebine

Parizo (pp) - En la aĝo de 77 jaroj mortis en Parizo s-ino Veuve H. Haudebine, la 31-an de januaro 1978. Ŝia morto estas por Esperanto grava perdo.

S-ino Haudebine, konata Esperanto-agantino por tria mondo, speciale en Hindio, fariĝis konata en F R Germanio per sia prelegvojaĝo pri Hindio en printempo 1977.

La Esperanto-movado ne forgesos ŝin!

Esperanto en Radio

Radio Zagreb. "Monografio" estis la titolo de tradukita de E. Lapenna rakonto travivita de la aŭtoro Sp. Stimec en F R Germanio. La aŭtoro cetero restadis kelkan tempon en Paderborn kaj estas unu el la aŭtoroj de libro "Klerigo kaj Kalkulado", en Esperanto kaj germana, se ni ne eraras. Estis post la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio tre bona rakonto en eleganta traduko.

Vieno. La tuta elsendo, ĉi-foje, estis bone aŭdebla: la komentario, la felietono de d-ro K. Beckmann pri "Nia prozo" kaj la ampleksa leterkestoj. Oni ĉiam devas miri pri la ampleksa varia programo. Sed pli da esperantistoj devus skribi!

Radio Romo estis fakte en la aero kaj aŭdebla, sed bedaŭrinde ne komprenebla.

Radio Vatikana estis kiel ĉiam sufiĉe bone aŭskultebla. Post la kutima semajna liturgia penso Radio Vatikana raportis pri parolado de la papo okaze de la 30-a datreveno de la forpaso de Gandhi kaj lia dogmo pri senforteco, kiu estas multe ligita al paco kaj dia amo. Krome oni memorigis i.a. la 100-an datrevenon de papo IX-a, al kies honoro la itala poŝto eldonas poŝtmarkon.

Radio Varsovio. Furora temo de la semajno, kiel jam en la antaŭaj, estis la balotoj de la elementa grado. Tiu temo respeguliĝis ankaŭ en la rubriko "La Semajno en Pollando" kaj en la dimanĉa Esperanto-Ekspreso. Sed ĉu oni ne tro multe elstarigis la temon? Ankaŭ ĉe ni okazas tiaj balotoj, oni ilin nomas "komunumaj" kaj multaj homoj entute ne notas ilin.

Kun intereso ni aŭskultis la "Panoramon de internaciaj eventoj", en kiu oni parolis pri la plej gravaj internaciaj okazaĵoj. Laŭ la pola vidpunkto kun optimismo rigardas la interparolojn en Genevo pri malarmado kadre de UNO. Malpli optimisma estas pri la interparoloj en Vieno la Varsovia vidpunkto. Fakte tamen estas, ke Sovetunio estas la plej grava ekonomia partnero de Pollando. Tion denove akcentis la vizito de la pola ĉefministro en Moskvo. Ne mankis en la "Panoramo" la problemoj de Proksima Oriento, de la Afrika Korno inter Somalio kaj Etiopio, tiuj de Sudafriko kaj Rodezio, la interparoloj inter Sadat kaj Carter kaj mencio de la Algerio pintkonferenco. Fine de la panoramo la parolisto trovis kelkajn vortojn pri Beogrado, kie oni serĉas konsentan platformon pri la finaj dokumentoj surbaze de Helsinki kaj malstreĉo.

Dimanĉe mi denove aŭdis la 5-minutan Esperanto-anguleton kadre de la germanlingva programo. Jerzy Grum ĉi-foje citis el n-ro 2/78 de Pilo-Press, nome la recenzojn pri diversaj Esperanto-radiostacioj kaj laŭlegis la recenzon pri Pola Radio. J. Grum konstatis, fine de la anguleto, ke PP kaj EER faras pioniran laboron sur la kampo de radio-recenzado.

La Esperanto-Ekspreso aŭdigis la cirkuleran leteron de MEM "Al la Tutmonda Esperantistaro", kiun ankaŭ ricevis Pilo-Press kaj en kiu oni konstatas i.a. "ke granda plimulto de la esperantistaj asocioj kaj gazetoj ĝenerale ignoris ĝin". Ŝajnas al ni, ke pri la paco oni parolas tro multe kaj tro malmulte agas, kion ĉefe povas nur fari la registaroj. Sed la interesoj de la nacioj, en la okcidento kaj en la oriento, ofte blokas la multajn intertraktojn.

Ŝajnas, ke la pli maljuna generacio fidus pli multe al la juna generacio. Tion denove montris la intervjuo, kiun faris A. Pettyn kun d-ro Støp-Bowitz, prezidanto de la Norvega Esperanto-Asocio. Ĉu vere unu junulo estas la proverba "hirundo", kiu aktivigas la Norvegan movadon. Laŭ la vortoj de Støp-Bowitz tio ŝajnas tiele esti. Oni ne forgesis la pupteatran aspekton kaj la rilatojn inter Zagreb kaj Tromsø. Intertempe la klubo Oslo kunvenas kaj agas tradicie. - Cetero, pri la norvega movado oni aŭdas relative malofte kaj malmulte.